

# TUTMONDA ESPERO

(KATALUNA ESPERANTISTO)

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas ĉiunonate en esperanta kaj kataluna lingvoj; kataluna literaturo; enlanda kaj eksterlanda movado; rakontoj, amuzajoj por instruata praktiko k. t. p.

## ABONOJ

Jara abono . . . 3 frankoj (1'20 sm.)  
Unu numero . . . 25 centoj. (10 sd.)

Espece (ĉiunonata numero) estas ricevita po sia valoro.

Ĉiuj mendoj devas esti akompanataj de mono.

Ĉiuj mendoj estu farataj per germanaj, francaj aŭ hispanaj poŝtmarkoj; per francaj aŭ hispanaj papercupoj; per internaciaj respondekuponoj da 10. sd. kaj per ĉekoj an transgitoj de la Cefbanko Esperantista.

Abonoj komencigas en Januaro, Aprilo, Junio kaj Oktobro. Jam aperintaj numeroj oni ricevas nur se ili estas en tenado.

Oni bonvolu skribi legeble sur respondekupono, an aldoni respondekuponojn al la letero, se oni postulas respondon.

## ABONISTOJ

Francaj: Librejo de Esperanto, 15, rue Montmartre - Paris

Katalunaj: S-roj Sallier kaj R., Preacto - Sant Pells de Guisols.  
S-ro Pflieger, Lito-vendisto - Sabadell.  
S-ro J. Palmarola, P. Major - Vic.

## TARIFO POR ANUNCOJ

Tuta paĝo . . . 12 frankoj (4'80 sm.)  
Duono da paĝo . . . 7 » (2'60 »)  
Kvarono . . . 3'50 » (1'40 »)  
Okono . . . 2 » (80 sd.)

Anoncoj por peti korespondadon kostas 10 centoj. (4 sd.) ĉiu linio.  
Por 3 fojoj rabato . . . 10%  
Por 6 » . . . 20%  
Por tuta la jaro . . . 40%

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO  
Paradis, 12 - BARCELONO  
Pri administraciaj aferoj skribu al S-ro RIBERA

# STUDENTO

Unu internacia organo de studentoj  
(kun stenografaj eldonoj AORO) Monata

Jara abono, 1 sm. - Specimeno  
1 int. resp. kupono.

Redakcio kaj Administracio:  
Jecná ul 24, Praha II. - BOHEMUJO

# LA REVUO

Internacia monata literatura Gazeto  
kun la konstanta kunlaborado

D-ro L. ZAMENHOF

Œa Nuchette K.º, 73, R.º St.-Germain.-PARIS

Jaro: francojfo, fr. 6 - Eksterfrancojfo, fr. 7

unu fojon . . .

Humorajaro banga por la Esperanta lernado, sin amuzante.

Unu ekzemplero . . . 10 centoj (4 sd.)

10 » . . . 1 » (40 sd.)

50 » . . . 4 » (1'60 sd.)

Mendoj (kun mono, anstataŭe) al S-ro MINKALO  
Cases: Selmerin, 239 | B A R C E L O N A - Espanjo.

Neniu malgaja Esperantisto  
legas la Gazeton

# „JEN“

Portaferriça, 17. - BARCELONA

# TUTMONDA ESPERO

(KATALUNA ESPERANTISTO)



Barcelono, Marto 1910

25 cent.

JAM APERIS JAM APERIS

★ CLAU ESPERANTO ★ POŝVORTARETO

Kataluna Slosilo ★ Esperanto-Català ★  
★ Català-Esperanto ★

100 ekzempleroj (afrankite) . . . . . 4 frankoj  
Una ekzemplero afrankite . . . . . 0'75 frankoj

• • Sin turni al la eldonisto S-ro R. TOBELLÀ CASTELLTORT, strato Carme, 18. - BARCELONO • •

# KOLEKTOJ KAJ KOVRILOJ

## DE TUTMONDA ESPERO

### Atenció, esperantistes!

Encara és possible adquirir algunes col·leccions de **TUTMONDA ESPERO** dels anys 1908 i 1909.

	Pleos.
Col·lecció sense relligar. . . . .	3
» » (comprès franqueig) . . . . .	3'25
Col·lecció ricament relligada amb artístiques cobertes de tela groguenca portant el nom de la revista estampat amb tinta verda . . . . .	5'25
Col·lecció en les mateixes condicions (comprès franqueig) . . . . .	5'75
Cobertes soles . . . . .	1'50
» » (comprès franqueig). . . . .	1'75

Sin turni al sinjoro Administranto de **TUTMONDA ESPERO** (Paradis, 12 - BARCELONO)

## ĈAPELOJ KAJ ĈAPOJ

Oni vendas ilin malatpreze

### MANUELO BALLÉSPI

Strato Ample, 41, apud Regomir  
BARCELONO (KATALUNUJO)



# TUTMONDA ESPERO

## (KATALUNA ESPERANTISTO)

Ĉiunonata revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakelo kaj Administracio: Paradis, 12 - BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

3<sup>a</sup> Jaro

Barcelona, Marto 1910<sup>a</sup>

N-ro 27

ENHAVO.—Kiu esperantistiĝos?—Ni laboru!—Rakonto.—Impresoj de Belga samideanino pri la Barcelona Kongreso.—La granda kometo de 1910.—El gran cometa de 1910.—La eliro de la suno.—Anekdotoj.—Humoraĵoj.—La Homevitima fraŭlino.—Diversaj sciigoj.—Bibliografio.—Gazetaro esperantista.—Prinuntempa hieroglifo.—Jarlibro de la Kataluna esperantistaro.—Anoncoj.

### KIU ESPERANTISTIĜOS?

Jen demando, kiun mi faris al mi kiam mi unuafoje aŭdis rakonti ke Esperanto estas la unua sukcesonta internacia lingvo.

Jen demando, kiun ankaŭ sin farus kiu aŭskultus, kiu kiel mi aŭskultis, malbonajn esperantistojn klarigante tion, kio estas nia inda celo.

Tial, mi opinias ke ne ĉiu kiu povas sin nomi esperantisto, kiel esperantisto estas bona. Pli ol lingvakonadon, mi kredas oni bezonas bonkoni la internan ideon de nia novado: estas necese batali pace sed konsciencie, kiel por liberiga idealo kiu plej rapidigas la interproksimiĝadon de la popoloj.

Mi ja scias ke interkomprenilo akceptita de ĉiuj homoj, estus la ĉefa motoro de la civilizacio, sed estas bedaŭrinde ke oni akceptu ĝin senkonsciencie; tio korpremas.

Verlertaj samcelanoj! Hodiaŭ, ke Esperanto kiel viva lingvo ne estas neefektivigebla utopio, turnu vian atenton al tio, eduku dece tian plej multon da eklernantoj kiuj ne konas bone nian sanktan proponon, pripensu vaste kaj eble ni interkonsentos, ke ju pli baldaŭ ĉiuj sciigos pri la alta signifo de nia agado des pli baldaŭ fariĝos konsciencie pacaj batalantoj, sekve ankaŭ des pli baldaŭ Esperantismo atingos la belan sonĝon de la homaro. Supren la koroj!

Ha! Ĉu via kuraĝo ne centobliĝas kiam, vi vidas ke nia rondo familia grandiĝas rapidege?

Mi kredas vin vidi ĉiujn, jesante per la kapo, kaj ankaŭ kiel malproksima bruanta ondo kiam al bordo de la lazura maro sin direktas, mi aŭdas ĥore miloj da dankemaj malliberuloj dirante al ni:—Antaŭeniru! Ne laciĝu!

Klopodu ni, do, por ke neniu plu povu sin demandi, kiu esperantistiĝos?

Sabadell.

APLEC' ANO.

## NI LABORU!

Oni kredis, ke post la fondo de nia TUTMONDA ESPERO, nian plej grandan paŝon antaŭen en Esperanto ni faris, tial ke ni kreis gazeton esperantan. Kiu tion kredis, li eraris.

Certe, tiu propagandilo estas valora, kaj montris nian esperantan spertadon, sed ĝi ne estis plentaŭga por la varbado de novgesamcelanoj. Nia gazeto taŭgas nur ĉefe kaj nature, por tiuj, kiuj jam estas samideanoj; nur por tiuj, kiuj jam estas esperantistoj konantaj nian lingvon, sed ne por tiuj kiuj ĝin ne konas, malgraŭ ke tiu gazeto enhavas katalun-esperantajn kronikojn.

La plej taŭga ilo por atingi nian celon, estas,—laŭ nia opinio,—la ĉiutagaj ĵurnaloj kaj gazetoj de Katalunlando; estas tiuj gazetoj, kiuj propagandas aliajn ideojn, kaj kiuj havas proprajn gelegantojn. Ĝenerale, ĉion, kio estas nekomprenbla ni forlasas; ni ne atendu, do, ke la neesperantistoj legu aŭ abonu nian esperantan gazeton; ni iru al la homoj, ne atendante ke ili venu al ni; ni ne atendu ke, ili venu ĉe niajn grupojn, aŭ ke ni iru la ilian; ni malmulte varbus.

Ni memoru, ke, nia ideo kvankam simpla pro sia programo, bezonas, kiel la ceteraj ideoj, konstantan propagandadon eĉ ĉe unu sama homo; ni memoru ke, nia ideo postulas; pro sia grava celo konstantan senĉesan propagandadon; ke oni ĉiam ĝin priparolu; ke oni ĉie konu ĝin, ĝis kiam oni ĝin akceptos entute.

Nia plej taŭga maniero, do, estas disvastigi la Zamenhofan lingvon per nia natura lingvo; ĝin propagi, kaj skribi pri ĝi, kiel plej baldaŭ eble, eĉ ĉiutage ĉu eble. Kaj fari ĉi tion estas nek malfacile nek neeble. Ĉiumonate aperas libroj—originale aŭ traduke verkitaj—kiujn oni povas komentarii kaj rimarkigi iliajn valoron kaj celon: ĉiumonate aperas revuoj enhavante artikolojn pri sciencoj, artoj, sociamovado, eltrovoj, k. t. p. kiuj nedubeble interesos ĉiujn; pli malpli ofte oni ankaŭ publikigas artikolojn pri lingvoj, pri naciismo; kaj ĉiutage nia esperanta tutmonda movado liveras al ni motivojn por priparoli pri nia internacia lingvo, kaj elmontri per faktoj certaj la gravecon de nia Esperanto, kiuj certe konvinkos pli multe ol niaj paroladoj publikaj.

Bedaŭrinde, oni tion ĉi entute ne faris ankoraŭ en Barcelono, kaj mi konfesas ke mi ne komprenas la kialon. Ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj ĉi tieaj, akceptis nian internacian lingvon aŭ almenaŭ sentis grandan bonvolecon por ĝi; ili, akceptas niajn artikolojn pri Esperanto kiam oni sendas, kaj oni publikigas ilin; sed, malgraŭ ĉi tiu bonakceptado, ni ne utilis tiujn ĉi ĵurnalojn.

Se la esperanta organizado en Katalunlando estus perfekta, mi fide esperas ke mia propono atingus efektivecon, tial ke ĝi akceptus ĝin kiel necesa. Sed bedaŭrinde ke ĝi ne ekzistos, kaj aliflanke bedaŭrinde ke oni ne komprenu ĝian urĝan kaj nepridiskuteblan kreon, mi mian proponon adresas al barcelonanoj, el kiuj, kamaradoj inteligentaj kaj spertaj de mi

konataj, povas entrepreni tiun ĉi laboron kun kompetenteco kaj kun espero je ĝiaj rezultatoj.

Ĉu ankaŭ denove la aliurbanoj devos preni sur sin tiun ĉi montritan entreprenon? Pro via honoro, barcelonaj samideanoj, ĉi tion ne permesu!

DOMINIKO SERDÁ.

El «*Esperanta Semo*».—Sabadell.

## RAKONTO

Inter la konataj trinkuloj kiujn mi konis estas unu, kies nomon, mi, silentos; sed kiun mi tamen prezentos al vi. Mi vin petas.

Estu li Robillard, ni supozu.

Mi ne diros al vi ĉion kion li ensorbis dum unu tago, absintojn, vermojtojn kaj aliajn similajn trinkaĵojn, ĉar certe vi min kulpigus de superfluo.

Estu vi simple instruitaj de tio ĉi: tio estas, ke malgraŭ la bona vento, kiun li ŝajnis havi en siaj veloj, Robillard gvidis sian barkon, tiel freneze, ke ia tago la fundon tuŝegis. Alimaniere parolante; li havis krizon de *Delirium tremens*.

Tiu pulo timinda mordiote al li la orelon, Robillard ne estis timigita.

Ankaŭ li decidis sin korekti: tamen, malgraŭ sia bonvolo li ne povos certe kontraŭbatali al la tiel ĉarma invito de «puŝu» lerte pentrita ĉe ĉiuj drinkejporoj!—Li pripensis al bonega procedo. Forlasi Eŭropon por la barbaraj landoj, kie la alkoholo ne estas ankoraŭ konata, la insuloj dezertaj, kie neniu drinkejo oferas al la ventetaj karesoj sian branĉon de simbola abio.

La nelasebla hazardo atentis pri tiu glora drinkemulo.

Matene, kiam li legis la ĵurnalon, tuj siaj okuloj perdiĝis sur la vasta teritorio de l' anoncoj. Li eksciis tiamaniere ke S-ro Flokon maljuna direktoro de cirko, pugnabatestro kaj ankaŭ pugnabata profesoro, dezirus trovi kunvivanton, por malproksima esplorado.

Li deziris kapti kelkajn didelfojn en la *Nouvelle Galles du Sud*, kaj pro tio estis necese sin prezenti ĉe S-ro Flokon, 6<sup>a</sup>, strato Batignolles (unua pordo maldekstre, en la korto)

Tiu avizo ne falis en la poŝon de l' unumanulo! Estante decidita, Robillard, kiam li estis surmetinta sian jaketon, tuj iris ĉe la proksiman trinkejon, ho! nur por trinki lakton... Sed, ho ve! la mateno ne pasis, vi bone pensas, antaŭ ol li trinku sian duondekduon da absintoj. Tio estis la signalo de l' refalo.

La morgaŭon, li rekomencis trinki; same la sekvantajn tagojn. Tiel bone, ke la loga profilo de S-ro Flokon sin perdis baldaŭ en la nebulegoj de l' indiferenco.

Adiaŭ ankaŭ, Far West, Sahara, kaj aliaj stepoj malproksimaj! La pura aero, la rajdadoj en l' arbaro, ĉio estis forigita de l' programo, tute forgesita.

Post kelkatempo tial ke, li revenis hejmen, ĉiam drinkinte kiel ordina-

re, Robillard sin perdis. Tio ĉi eble ne surprizos vin, sed tio kio eble vin interesos, estas ke dum siaj nerektaj marŝadoj, li falis apud flamingo, kiu per siaj rebriloj edvidigis surskribaĵon bluan, kie oni legis «*Strato Batignolles*». *Strato Batignolles*... pripensis Robillard, sed ĝuste la strato de mia fama vojaĝanto... se mi lin vizitus...»

Li ekmarŝis malgraŭ ke noktomezo estis pasinta. Li sonoris kaj sonoregis ĉe la pordo de sia pugnabatmajstro.

Post horduono, ĉirkaŭe, nevekigita fraŭlino malfermas la pordon, kaj ĉirkaŭita per siaj koltukoj demandis: «Kiu, tie estas?»

—«Estas,—respondis la alia—por paroli al S-ro Flokon, kaj tuj!...»

—«Sed li estas enlitigita», diris la fraŭlino.

—«Despli malbone».

—«Sed li dormadas!»

—«Ke li dormu aŭ ne, mi nenion volas scii. Nepre mi devas paroli al li. Estas urĝa.»

Fine oni lin prezentas al la pugnabatestro. Demandante Robillard, ĉu estas al S-ro Flokon al kiu li parolas, kaj se tiu ĉi S-ro Flokon estas bone tiu, kiu petas kunvojaĝanton por la *Nouvelle Galles du Sud*, S-ro Flokon stariĝis furioza sur sia lito.

—«Jes»,—li diris—«estas bone mi. Sed vi konfesos ke la horo ne estas bone elektita por paroli pri tielaj aferoj!»

—«Ne koleriĝu»,—respondis trankvile la bonega petolulo—«kaj pri nenio timu.»

Mi ne parolas al vi longe. Mi nur venis por sciigi al vi, ke malgraŭ mia antaŭa decido... mi vin forlasas. Estas ne utile pensi al mi Sinjoro...»

Tradukis el Franca lingvo,

R. LAROUSSE.

## IMPRESOJ DE BELGA SAMIDEANINO PRI LA BARCELONA KONGRESO

(Elberpitaj el detala, vojaĝ-kaj Kongrespriskribo.)

En la Muzeo de Toulouse ni faris nian unuan feliĉan renkonton de samideanoj, kelkaj Angloj kiuj tuj venis al ni por premi nian manon. Tiu unua renkonto estis por ni vera ĝojo. Tiam, ankoraŭ pli bone ol en granda kunveno, oni eksentas la verecon de la vortoj de nia Majstro: «En la mondon venis nova sento.» En fremda lando, kie oni estas izolita de ĉiuj konatuloj, samideano estas por ni, amiko.

En la stacidomo de Toulouse, je nia foriro, ni trafis Holandan samideanon. Estis la dua agrabla renkonto.

La sabaton 4<sup>an</sup> ni forlasis Carcassonne kaj ĝiajn vidindaĵojn je la dekunua, por alveturi, fine al la celo de nia vojaĝo.

Estis la granda tago por la Esperantistoj. En Toulouse ni nur vidis izolitajn samideanojn. En la bufedo de Narbonne, je la tagmezo ili kunvenis el la

plej diversaj direktoj. Multaj vagonaroj tie alvenis preskaŭ je la sama horo, kaj ĉiuflanke oni nur vidis verdkolorajn stelojn, steletojn, flagojn kaj flagetojn. Multfoje centope ni tie kunestis. Oni nur aŭdis ĉirkaŭ si la Zamenhofan lingvon.

Je la unua, forveturo al Port-Bou, Neforgesebla estas la alveno, kaj precipe la foriro el la hispana limurbo. Milo da Esperantistoj atendis, pacience aŭ malpacience, sian vicon ĉe la limdepagejo, kaj la eblecon envagonariĝi. Estis terura afero! Estis luksa vagonaro, kaj nia «luksa» bileto donis al ni la rajton, dum kvar horoj, sidiĝi en la koridoro sur nia valizo. Multaj vojaĝantoj kiuj ne trovis lokon, restis sur la kajo kaj tranoktis en Port-Bou.

De nia nekomforta loko ni tamen ĝuis beleĝan pejzaĝon: inter la montetoj, post ĉiu tunelo, aperas kiel bela blua lago: estas la Meza Maro. Kaj nin ĉarmis ankaŭ la dolĉa verdaĵo de la olivujoj. Dum la vojaĝo ni agrable interkonatiĝis kun multaj fremdaj samideanoj.

En la stacidomo de Gerona, la tuta tiea grupo estis kunveninta por saluti la kongresanojn per laŭteĝaj entuziasmaj aplaŭdoj. Estis nia unua kora akcepto sur la hispana tero.—Fine, je la duono post la sepa, ni estis en Barcelono. Kaj la alveno de la samideanoj estis tiel grandara, ke ĝi estis, kompreneble, iom konfuza. Koncerne nin, ni havis veran malĝojon. Ni esperis renkonti ĉe la stacidomo niajn du Antverpenajn prezidantojn, kiuj jam estis alvenontaj la antaŭan tagon, kaj ni jam antaŭe ĝojegis pro la ideo fine revidi en Hispanujo, kiel amikojn niajn, karajn samurbanojn. Ni vidis nenion!

Mia kunvojaĝanto, la juna Borgerhont'a prezidanto, kiu ne jam estis ricevinta sian bileton pri loĝado, iris rekte al la Akceptejo. Mi, intertempe, kun du hispanaj portistoj, iris piede al mia hotelo, tra la plej mallarĝaj stratetoj de Barcelono, kie la domoj ŝajnas tiel altaj ke oni ne plu vidas la ĉielon. Mi alvenis, fine, en la hotelo X, kaj retrovis niajn amikojn el Antverpeno.

Nu, kion mi dirus pri mia restado en Barcelono? En nia hotelo ni estis proksimume dudek kvin Esperantistoj, la plej multaj Belgoj, aŭ Francoj, ankaŭ Hispanoj, Angloj, Germano, Maltano. La hotelestro estis tre afabla, la manĝaĵoj estis bonaj; la fruktoj bonegaj, kaj la horoj kiujn ni pasigis ĉe la tablo, en nia rondeto de samideanoj, estis ĉiam vere agrablaj. Ni estis kvazaŭ ĉiuj kiel amikoj. Ĉiuj promesis ĉeesti la Antverpenan kongreson.

Generale ni kun granda ĝojo rimarkis ke la Belgoj faris bonan impreson. Per aplaŭdegoj oni salutis la belan paroladon de la prezidanto de la Belga Ligo, samtempe delegito de la Belga Registaro. La triobla Belga gajninto de la Floraj Ludoj akiris ĉies simpatian kaj admiron. En la laboraj kunsidoj li inde prezidis la fakajn kunvenojn de farmaciistoj. Ankaŭ S-ro abato Richardson tre favore riprezentis Belgujon kaj ĝian Esperantan movadon. Eĉ S-ro Roe helpis por organizi kunvenojn por junuloj. Kaj en nia pli modesta rondo, en nia hotelo, ni sukcesis gajni la korojn de niaj kunloĝantoj per nia gaja kantaro. Ĉiuj tiuj faktoj, gravaj kaj malgravaj, antaŭvidigos al ni sukceson por nia granda sepa kongreso.

Ĉu mi nun priskribus kiel mi pasigis la kongresajn tagojn? Unue mi diros kelkajn vortojn pri Barcelono. Ĝi estas bela, grandega urbo, kun larĝaj stratetoj kaj bulvaroj, vastaj placoj kaj artaj konstruaĵoj. Inter la multnombraj larĝaj vojoj oni rimarkas arojn da malnovaj stratetoj, tre mallarĝaj, kiuj estas vere strangaj kaj vidindaj. Densa homamaso moviĝas sur la stratetoj, precipe sur la Rambloj, aŭ ĉefaj bulvaroj, kiuj trairas la urbon laŭ ĝia tuta larĝeco, de la bela placo de Katalunujo ĝis la haveno kaj la monumento de Kolumbo, La

plej bela, la plej movplena parto de la Ramblo estas la Ramblo de la Floroj. Tie, en du longaj vicoj, sur ŝtonaj butiktabloj, intersekvas la multkoloraj kaj bonodoraj elmontrejoj de la florvendistinoj. Tie ni promenis preskaŭ ĉiun vesperon, ĝis la kafejo «Continental», kie ni povis renkonti multajn eminentajn samideanojn. La movado sur la Ramblo daŭras preskaŭ la tutan nokton. De nia hotelo, en apuda strato, ni povis ĝin vidi kaj aŭdi. Tre interesa estas la vidaĵo de tiu popolamaso sur la Rambloj, kie homoj ĉiurangaj promenas intermiksite, kie aro da laboristoj, da vendistoj, da junaj almozuletoj preterpasas bele vestitajn virinojn, kun belega nigra hararo. Preskaŭ ĉiuj virinoj estas sen ĉapelo, precipe je la vespero, aŭ havas kiel kapvestaĵon nigran puntan ŝalon arte drapiritan. En la mano ili portas la sendisiĝan ventumilon, kiu fariĝis por la belaj Hispaninoj kiel necesega ludilo. La altranga kaj la popola virino, ĉe festoj, ĉe kunvenoj, sur la stratoj, senĉese ĝin movigas, kun tute speciala, neimitabla ĉarmo. Ventumilojn oni vidas, luksajn kaj senluksajn, ĉe preskaŭ ĉiuj vendejaj fenestroj; ventumilon verdan oni donis al la kongresanoj kiel memoraĵon de la kongreso; kaj per ventumilo donacis nia kara prezidanto la samideaninojn el nia hotelo, post nia intima vesperfestoj je l' neforgesebla tago de la Floraj Ludoj. — Kaj ni ankaŭ, vespere, ni eliris sen ĉapelo kaj uzis ventumilon.

Ne nur la pacaj burĝoj de Barcelono, ne nur la gajaj grupetoj de Esperantistoj, kun sia tre videbla arĝentumita insigno, promenis sur la Rambloj. Multegaj soldatoj ĝendarmoj kaj urbaj gvardioj aŭ policanoj, promene solaj aŭ en grupoj, rememorigis al ni la malfeliĉajn okazintaĵojn kiujn ĵus travivis Barcelono. Malgraŭ la ŝajna trankvileco de ĝiaj loĝantoj, oni sentis en la aero kiel ion nekutiman, ion maltrankviligantan. Dum la nokto oni ofte povis aŭdi la paŝojn de ĉevaloj; estis la ĝendarmoj kiuj faris sian rondon.

Kelkaj belaj monumentoj el Barcelono estas la Katedralo, la Juĝejo, la Universitato, la Palaco de Belartoj, la Mara Stacidomo, la Triumfarko, la altega kolono kun statuo de Kolumbo, kaj aliaj. Belegaj estas la vasta placo de Katalunujo, kun siaj multaj palmarboj, la placo de Urquinaona, kaj la pli malgranda Reĝa Placo, kie la palmarboj atingas neordinaran altecon kaj belecon. La haveno kun sia antaŭ-kaveno, estas ankaŭ tre interesa. De la multnombraj montetoj kiuj ĉirkaŭas Barcelonon, precipe de la Monto Tibidabo, oni ĝuas belegan vidaĵon sur la tuta grandega urbo, sur la haveno kaj la senlima Meza Maro.

La klimato de Barcelono estas dolĉa: ni ĝuis la tutan tempon belan someran veteron, ne tro varman.

Nun mi konfuzas rimarkas ke mi tute malzorgis la ĉefan parton de mia raporto, tiu estas la Kongreso.

(Por eviti tro longajn ripetaĵojn aŭ tro personajn travivaĵojn, mi ellasas tiun parton el mia raporto, kaj nur aldonos kelkajn konkludajn ĝeneralajn impresojn.)

Kaj tiam (la dimanĉon 12<sup>an</sup>), post la vespermanĝo, ni adiaŭis kun granda bedaŭro niajn Antverpenajn prezidantojn kiuj intencis forveturi la lundon matene fruhore por voĝaji tra Hispanujo. Multaj Esperantistoj jam estis forlasintaj Barcelonon, kaj ni sentis jam la malĝojon de la disiĝo, la izolecon de la fino de la Kongreso, post agrablegaj, neforgeseblaj tagoj.

Nepriskribebla estas la impreso kiun lasis al mi la Kongreso kaj mia restado en Barcelono. Tie, inter tiuj centoj kaj centoj da samideanoj, oni spertas

per si mem ke en la Esperantistaro la vorto «frateco», ne estas vana vorto. Tie ne plu ekzistas naciaj baroj; neniam autauĉe viditaj samideanoj el la plej malproksimaj landoj, ŝajnis por ni kiel malnovaj konatuloj, kaj multaj el ili fariĝis, de la unua momento, kiel veraj amikoj. Mi opinias ke la Kongreso tre bone sukcesis, precipe kiam oni konsideras la gravajn okazintaĵojn kiuj ĝin antaŭiris. Ĝi markas novan feliĉan paŝon en la antaŭenirado de nia kara Esperanto, kaj refortigas nian fidon en la fina venko kaj triumfo. La loĝantaro de Barcelono ne restis indiferenta al la Kongreso. Ankaŭ la neesperantistoj ĉeestis multajn festojn, kaj partoprenis en la ĝenerala entuziasmo. Ĉe multaj magazenoj, kafejoj kaj hoteloj ondiĝis la verda flago, kaj multaj el ili estis ornamitaj per verdsetelitaj tukoj. Tre servemaj estis la urbaj gvardioj; dekduo el ili parolis esperante. Nia himno «L'Espero» ne nur laŭte resonis, per milo da voĉoj, ĉe ĉiuj kongresaj festoj; ankaŭ la Barcelonanoj ĝin lernis kaj stratmuzikistoj ĝin ludis preskaŭ ĉiun vesperon sur violono, sub la balkono de nia hotelo: tre kora, tre afabla, estis la akcepto de ĉiuj. Jam de la unua tago post mia alveno, kiam mi tiel agrable promenis kun la juna Esperantista grupo el Sabadell, mi tute paciĝis kun la tuta Hispanlando; kaj tuj forflugis la memoro de la suferadoj de mia patrolando en pasintaj jarcentoj. Ni estis nur gefratoj kaj amikoj.

Unuvorte, kun granda, tre granda bedaŭro, mi forlasis Barcelonon, la lundon 13<sup>an</sup>, per la rapida nokta vagonaro. Mi devis akceli mian foriron ĉar mi intencis viziti parencojn en Francujo.

La sabaton je la unua, ĉe la Norda Stacidomo en Parizo, mi retrovis mian Borgerhout'an prezidanton (ni antaŭe interkonsentis pri la foriro), kaj je la sesa ni estis ree en Antverpeno! Ni ne sentis laciĝon! Jam la saman vesperon ni komunikis al la samideanoj de la Antverpena Grupo niajn plej novajn impresojn, nian plej varman entuziasmon, pri nia neforgesebla, feliĉega vojaĝo.

MARIA POSENAER.

2 Okt. 09.

## LAGRANDA KOMETO DE 1910<sup>A</sup> EL GRAN COMETA DE 1910

La kometoj estas vagantaj astroj, kiuj aperas de tempo al tempo en la spaco. Ili estas lumaj korpoj, kiuj trairas ekscentran astrovojon, kaj la atmosfero kiu ĉirkaŭas ilin, similas voston kiu kelkfoje, pro optika fenomeno, estas kvazaŭ barbo kaj alifoje kvazaŭ hararo, laŭ la diversaj dekliniĝoj.

Antikve, la apero de kometo estis konsiderata kiel Dia signo, kiu nur anoncis malfeliĉojn (pro malveraj profetaĵoj de la astrologoj, kaj pro iuj ajn bedaŭrindaj koincidoj) kaj ĉiuj timis ĝin; sed la scienco, sin perfektigante, lasis post si tiun superstiĉon, malfermante novajn voj-

Són, els cometes, estrelles errants que de temps en temps apareixen a l'espai. Són cossos lluminosos, que recorren una orbita excèntrica, i l'atmosfera que els rodeja afecta la forma d'una cua, que algunes vegades, per fenomen optic, es mira com una barba, i altres com-e cabellera, segons les diferents inclinacions.

Antigament l'aparició d'un cometa s tenia per una senyal divina que anunciava solament calamitats (per falses profecies dels astrolegs i per algunes coincidencies desgraciades), i tothom la temia; però la ciencia, que s'ha anat perfeccionant, ha deixat enrera aquella superstiĉo,

ojn kaj direktojn al la astronomio, danko al kiuj, nun, forlasante senfundamentajn maniojn kaj timojn, ni nur admiras la belajn kaj interesajn spektaklojn, kiujn al ni prezentas la harmonio de pezcentreco de l'Universo, atentigante ni pri la progresoj de la astronomia scienco; naskita de la astrologio, ĉar la profetaĵoj de tiuj astrologoj, kelkaj hazarde divenitaj, vekis la homan scivolemecon por sin dediĉi al la studo de l' astroj:

La granda kometo tiujara (1910<sup>a</sup>) estis unuafoje vidata en Joannesburg (Suda Afrika) dum plentago de la 16<sup>a</sup> januaro, kaj pro malbona kompreno ĉe la trassendo de la eksterlandaj telegramoj oni eknomis ĝin *Drake'a kometo*, tamen science oni opinias ĝin eltrovita de neniu: tial ĝi estas nomata *granda kometo de 1910<sup>a</sup>*, klasifikante ĝin per la litero A, tial ke ĝi estas la unua eltrovita dum la jaro!

La 19<sup>an</sup> de la sama monato, je la kvara postagmeze, ĝi estis vidata de Observatorio Fabra, Dum la tagoj 20<sup>a</sup> kaj 21<sup>a</sup> duono da horo post la kuŝigo de la suno, ĝi estis videbla simplavide. En la tago 22<sup>a</sup>, pliboniĝis la kondiĉoj pri observado kaj, laŭ la ŝajna diametro de la centraĵo, la kometo malproksimiĝis de la tero, formante arkefleksitan voston. En la tago 23<sup>a</sup> la kometo prezentis saman aspekton kiel dum la antaŭa tago, kvankam ne tiel bone defineblan pro la vento kiu daŭris ĝis la 26<sup>a</sup>, dum kiu, malaperinte la ruĝa nuanco de la centraĵo pro la proksimegeco al la horizonto (refrakta efiko) tiu prezentis voltanarkon el verda nuanco kaj la vosto tute novan aspekton.

obrint nous camins i orientacions a l'astronomia, mercès an els quals, avui dia, deixant-nos de manies i temors sense fonament, sols admirem els hermosos i interessants espectades que ns ofereix l'harmonia de gravitaciò de l'Univers, fixan-nos en els avenços de la ciencia astronomica, nascuda de l'astrologia; car les profecies d'aquells astrolegs, endevinades algunes per atzar, despertaren la curiositat dels homes, dedicant-se a l'estudi dels astres.

El gran cometa d'aquest any (1910) fou vist per primera vegada a Joannesburg (Sud de l'Àfrica) en ple dia 16 de Janer; i, per una mala inteligència en la transmissió de telegrames estrangers, en principi va donar-sel-li 'l nom de *kometa Drake*, essent aixís que científicament no 's considera descobert per ningú, sinó per tothom (com el de l'any 1882), i per aquesta raó se l'anomena *gran cometa de 1910*, classificant-lo amb la lletra A per ser el primer descobert durant l'any.

El 19 del mateix més, a les quatre de la tarde, va esser vist per l'Observatori Fabra. Els dies 20 i 21, mitja hora després de la posta de sol, era visible a simple vista. El dia 22, les condicions d'observaciò milloren, i, a jutjar pel diametre aparent del nucli, el cometa ja s'allunya de la terra, formant una cua arquejada. El dia 23 ofereix el mateix aspecte que 'l dia abans, encara que no 's pot definir tan bé a causa del vent, que va continuar fins el 25, dia en què, desapareixent el matiç rogenc del nucli per la gran aproximaciò a l'horitzò (efecte de refracciò), aquell ofereix un arc voltaic de matiç verdós, y la cua presenta un aspecte totalment nou. Pot dir-se que, el dia 26,

Oni povas diri, ke dum la tago 26<sup>a</sup> la fenomeno atingis la apogeon de sia beleco, kvankam la centraĵo ŝajnis malgrandiĝi.

Postaj observadoj pruvas ke akcentigas la malfortikeco de la centraĵo, tamen la vosto daŭrigas malmultdiference egala pri vasteco sen struktura ŝanĝado de la nuklaĵa punkto. La kometo estas nun malproksima rilate al la tero, povante esti vidata nur per decaj iloj.

Daŭrigas la observadoj, kaj astronomiistaj studoj pri la movoj kaj ceteraj fenomenoj de tiu astro, alia kiu venas aparteni al la Scienca historio, kiun la tempo kaj progreso de la homaro zorgos atingigi en estontaj jarcentoj, gradon de sufiĉa perfekteco por klarigi tiam, iajn okazintaĵojn, kies hodiaŭaj sekretoj estas nekognataj.

En alia artikolo mi pritaktos la kometon Halley, pri kiu nune, malgraŭ fantaziaj opinioj verŝajnaj al antikvegaj superstiĉoj, mi akceptas la rajtigitan opinion de astronomiistaj scienculoj (el ili la Direktoro de la Observatorio Fabra el tiu ĉi urbo, S-ro Jozefo Comas Solà), laŭ kiu ekzistas nenia danĝero pri la tera trempo en la vosto de tiu kometo, ĉar la eblaj okazontaj fenomenoj, ne estos sufiĉe teruraj por malutili nian vivadon. Inter ili, ni eble povos rigardadi la belegan spektaklon de pluvo da steloj.

Se aliajn fojojn estas okazintaj samaj faktoj kaj nenio fariĝis, pro logika kaŭzo, espereble la venonta apero de la kometo Halley nenian malbonon faros al ni, Ni restu do trankvilaj.

M. C.

el fenomen arriba a l'apogeu de la seva bellesa, si bé 'l nucli sembla que declinada en magnitud.

Observacions posteriors demostren que s'accentua la perdua de vigor del nucli, encara que la cua segueix, a poca diferència, igual en extensió, no havent variat la seva estructura del punt d'arrencada del nucli. El cometa 's troba ja relativament lluny de la tefra, no podent-se veure sinó amb aparells a proposit.

Segueixen les observacions i estudis dels astronoms vers els moviments i demés fenomens d'aquest astre, un altre que ve a formar part de l'història de la ciencia, que 'l temps i l'avenç dels homes cuidaran de què segles a venir arribi a un grau de perfecciò suficient pera explicar allavors certs aconteixements dels quals avui encara no s'ha arribat a conèixer els secrets.

En un altre article m'ocuparé del cometa Halley, sobre 'l qual, de moment, malgrat versions fantastiques, que tenen prou semblança amb les supersticions de temps antic, m'acullo a l'autoritada opiniò de savis astronoms (entre ells el director de l'Observatori Fabra d'aquesta ciutat, D. Josep Comas Solà) de què no hi ha cap perill en l'immersió de la terra dins de la cua d'aquell cometa, perquè 'ls fenomens que puguin ocurrer no seran de prou força pera perjudicar la nostra vida. Entre 'ls mateixos, probablement, podrem contemplar l'hermós espectacle d'una pluja d'estrelles.

Si altres vegades han succeït casos semblants i res ha passat, per raó de lògica és d'esperar que la nova aparició del Halley cap mal ens ha de fer. Estiguem, doncs, tranquils.

JOAN BERENGUER ROCA.

## LA ELIRO DE LA SUNO

Por la infanoj

Tiel parolis unu tago la instruisto :

«Miaj amataj infanoj : leviĝu frumatene unu el la juniaj tagoj; lasu ke la littuko malkovru vian korpon; lavu tuj vian vizaĝon kaj, jam vestitaj, iru al la supro de la monto tiuj kiuj loĝas en monta vilago, aŭ ĉe la marbordo tiuj kiuj havas la sorton loĝi proksime de la maro, kaj mi certigas al vi ke vi revenos tre kontentaj de la ekskurso.»

—Kion ni vidos?—demandis la infanoj.

—Ah, miaj filoj! Vi vidos la plej belegan spektaklon de la «Naturo». Vi vidos kiel eliras la Suno.

Oh! Kiel ĉarma estas la eliro de la Suno!...

Post kelkaj tagoj preskaŭ ĉiuj infanoj jam faris tion kion al ili petis ilia kara instruisto.

Aŭskultu la diligentan Johanon kiel li klarigas entuziasme kion li vidis.

«Kelkaj momentoj antaŭ la eliro de la Suno ŝajnis ke ĉio estis bruligita. En la ĉielo estis nuboj kiuj, ja, ŝajnis fajraj nuboj. Poste, subite, eliris kelkaj sunaj radioj... tuj mi vidis la duonon de la Suno kaj ĝi sendis al mi radibrilantan kaj arĝentan rubandon da lumo tra la pacega kaj blua akvo de la maro. Kiel kontenta estis mi tiam! Fine, leviĝis la tuta Suno? Mi tre entuziasmata, kriis: Vivu! kaj manplatfrapis ĝojege. Neniam mi estus kredinta ke tiu senpaga spektaklo estus tiel mirinda. Mi promesas iri vidi ĝin aliajn fojojn.»

La instruisto aldonis kiam jam Johano silentis :

«Lernu, karaj disciploj, rigardi kaj ami Naturon de malgrandaj aĝoj: tiel vi estos fortaj de korpo, kaj fortaj de animo.»

FRANCISCO NAVÉS.

Instruisto el Vich,

Januaro 1910<sup>a</sup>.

## ANEKDOTOJ

## «LA PLEJ BONA TRINKAĴO»

La plej bona trinkaĵo estas la akvo.

Ĝi estas la plej higiena el ĉiuj trinkaĵoj. Ĝi estis la sola trinkaĵo de multaj centjaruloj, dum la suferantoj pro la alkoholoj estas ne kalkuleblaj.

Ĝi estas ankaŭ la trinkaĵo kiu kontentigis la plimulton el niaj antaŭuloj kiuj havis pli bonsanon ol ni.

La akvo estas necesega al la vivo. El ĝi konsistas ĉirkaŭ la tri kvaronoj de la pezo de niaj korpoj.

Ne ĉiuj akvoj taŭgas por la trinkado.

Oni rezervis la nomon de *akvoj trinkeblaj* al tiuj, kiuj povas esti trinkitaj sen malutili la sanon.

A. MELIS.

## EN GASTEJO

Unu ĉasisto eniris en gastejon por matenmanĝi; li sidis apud tablo el ligno kaj vokas la mastron.

Tiu ĉi aperas tuj :

—Ĉu vi deziras matenmanĝi?

—Jes, respondis la ĉasisto, kion vi havas por matenmanĝi?

—Ni havas frititajn terpomojn, kolbason, kolbaseton, kaj...

—Aŭskultu min (diris la ĉasisto interrompante la mastron), ĉu vi hodiaŭ ne havas peceton da viando, tiel bongusta kiel tiu, kiun mi manĝis la lastan fojon kiam, mi venis tien ĉi?

La mastro kunigis siajn manojn kaj levigante siajn okulojn supren al la ĉielo, ekkriis: Malfeliĉaj ni, se ĉiufoje kiam vi venas tien ĉi, oni mortigus al ni azenon!

J. B.

Membro de «C. A.»

## HUMORAĴOJ

**Societa Laboro.**—Edzo: Mi absolute ne povas fari pluajn vizitojn kun vi hodiaŭ posttagmeze, Mario, ni devas labori.

Edzino: Kompataj ĉieloj, ĉu vi ne nomas tion, laboro?

\*\*

**Ŝi ne babilas sekretojn.**—Anjo: Nu, mia kara, vi ne diris al li tion—vi scias—kion vi promesis ne diri?

Fanjo: Karolino! Kiel vi povus tion pensi? Kaj, krom tio, mi ne ankorau vidis lin.

\*\*

**La efektiva Sinjoro.**—Aŭtomobilisto: Donu al mi la kalkulon, kelnero. Ni havis fromaĝon kaj biskvitojn, kaj mi trinkis glaseton da biero, kaj... kion la maŝinisto havis?

Kelnero: Salmotruton, duonon de botelo da mosela vino, nigrakafon kaj cigaron por kvin spescantoj.

\*\*

**Kion oni ne vidas.**—Koketulinio: Tamen, do, serioze, ĉu via edzino ne malaprobos, ke ni tiel ofte vidiĝas kune?

Virinamema Edzo: Ne, kio ekscitas ŝin estas la tempoj, kiam ni ne estas videblaj.

\*\*

**Dekoltita Vesto.**—Li: Ĉu vi ne opinias ke la nova vesto de mia edzino akomodigas al ŝi, kiel ganto?

Ŝi: Nu, do, diru ni kiel duonganto.

CLARENCE L. DEAN.

21. Phoenix Lodge Mansions  
Book Green, London W.—Anglujo.

Oni prezentas novan komedion, La ĉeestantaro, malaprobas amase, krom sinjoro kiu aplaŭdas per tuta sia povo.

—Cu plaĉas al vi la komedio? Demandas lin, sinjoro apudsidanta.

—Ne tute, ne.

—Kiel, do, vi aplaŭdas?

—Mi aplaŭdas tiujn, kiuj malaprobas tiel ĝuste.

\*\*

En restoracio.

—Kelnero, mi ŝatas manĝi bone. Prenu, antaŭ ĉio, tiun mondonacon, kaj diru kion konsilas al mi.

—Ke vi iru en alian restoracion.

\*\*

Inter ministro kaj lia filo.

—Ĉu vi sukcesis en la ekzamenado?

—Jes, patro mia, mi atingis ateston pri superkapableco.

—Kion oni demandis al vi?

—Ĉu mi estas via filo.

\*\*

Mokaĵo.

Ŝi: —Mia fratino estas pli malbela ol ni.

Li: —Do, estas tre malbela!!

\*\*

—Kiu kato ŝajnas al vi pli maljuna?

—Nature, tiu, kiu estas pli harblanka.

\*\*

Infano al sia patrino.

—Kial vi ne min helpas en la tradukado de mia leciono pri la germanlingvo.

—Kiel mi povas cin helpi? Mi nenian lernis tiun lingvon.

—Kiel bonaj estis viaj gepatroj!!

\*\*

Reĝo, pilkludante kun monaĥo, ricevis tiel grandaŭ pilkbaton, ke senaverte ekkriis:

—Tro granda pilkbato por esti sendita de simpla monaĥo.

—Via reĝa Moŝto povas fari ke ĝi estu sendaĵo de abato.

La reĝo konsideris tiel gracia tiun dusencan respondon, ke antaŭ ne longe nomigis la monaĥon, abato de granda monaĥejo.

\*\*

Advokato diris al rabisto, kiun oni ĵus liberigis dank' al lertega defendado:

—Vi ja povas min danki; via savo ŝajnas mirakla.

Kaj la ĵus liberigita respondis kun larmoj en okuloj:

—Sinjoro, mi estas malriĉa, sed ne zorgu, ĉar mi estas dankema. Kion mi unue rabos estos por vi.

Kolektis kaj tradukis.  
APLEC' ANO

Sabadell.

## LA HOMEVITEMA FRAŬLINO

Dediĉi al la bela fraŭlino F. F.

—Rigardu tiun-ĉi rozon, malpli freŝan ol via vizaĝo, malpli ruĝa ol viaj lipoj, malpli parfumita ol via buŝo. Mi deprenis ĝin por vi, por ke, metita en via brusto, sin movu envianta pro via beleco. Prenu ĝin.

Kial vi ne respondas kaj malproksimiĝas de mi?

Ha bela fraŭlino! Viaj timoj mortigas miajn gajaĵojn ĉu vi scias ke mi malamas la timemajn fraŭlinojn?

Jes, mi malamas ilin, mi malŝatas ilin. Ĉar mi ne povas koncepti virina n animon se ĝi ne estas tute boneco.

Ĉu vi konas iun ajn poeton? Mi prezentos al vi doloritan poeton, ĉar li estas fraŭlo enamiginta de homevitema fraŭlino, de fraŭlino kiu ne ridas, de la timema fraŭlino.

Tiel li ĝemas, pli ol kantas, petegante ĉiam amigardon. Lia liuto estas sia brusto kiu sopiras;

Amatino mia!

Amatino mia!

Ridu, rigardu, amu min.

Ĉu ne estas vi, la mia animo?

\* Via malafableco mortigos min.

Kaj estas vi la mia vivo!

La dolorita poeto deprenas de la preferita rozujo de sia ĝardeno, rozon grandan kaj belan, la plej granda kaj plej bela, kaj iras timeme oferi ĝin al sia amatino.

Ŝi vidas lin alveni kaj ridas; sed estas ŝia rido ironia ridego; kiu neniiĝas la enamigintan fraŭlon.

—Prenu ĝin—li balbutas kvazaŭ surgenue estus prezentanta sian riĉan oferon al la Virgulino. — Prenu ĝin, kvankam poste vi ĵetus ĝin al la koto, piedbatus kaj kraĉus ĝin.

Restas silente la fraŭlo, statike, atendante, gaja kaj trema, ion, kio povos esti sentenco kaj povos esti ĉielarko. Li ne spiras.

Tiam pasas flugante printempa hirundo. Ĝiaj flugiloj tuŝetas la blondan hararon de la fraŭlino. En kornico ĝi baltas. Kaj ĝi tuj kantas sian mistikan kantaĵon kompateman kantaĵon. Ĝi petas kompatemon, pro kio ĝi petegas amon.

—Ne kantu, sentimentala hirundo, kompatema hirundo, ne kantu. Estas neutila via kantado kaj via petado. Ĉu vi scias kiu estas tiu-ĉi fraŭlino? Ŝi estas fraŭlino kiu havas la animon malvarman, multe malvarman, glacitan, kvazaŭ la grizaj pecegoj de la glaciaj oceanoj. Estis ŝia koro io, kvazaŭ ŝtoneto de la rivero, kiun nek la akvo atingas moligi... Sed, por ke plibone vi ekkonu ŝin, mi diros al vi: ŝi estas la homevitema fraŭlino.

—Prenu, ĝin. Prenu ĝin!—daŭrigas ploretante la fraŭlo, etendante, tremema pro emocio, la kolorvibranta rozon: plena je freŝeco kaj parfumoj.

La fraŭlino rigardas mokema lin, ellasas kruelan ridegon, kaj forkuras saltante, kvazaŭ kapridino malafabla kiu grimpas sur la krutaj ŝtonejoj kiam la juna paŝtisto ŝin vokas por karesi ŝin.

La fraŭlo restas sola, malgaja kaj senespera ne povante eĉ plori sian malfeliĉon, kaj li daŭras kun la mano atendanta la rozon, oferante ĝin... Aerbloveto pasas kaj kisas ĝin kompateme...

Kiam mi vidos la izoleman fraŭlinon kiu mokas je la amo, mi haltigos ŝin en sia vojo kaj mi kuraĝos demanda ŝin.



—Aŭskultu min, ŝtonkora fraŭlino. Kial vi ne estas afabla? Kial vi ne estas cedema kial vi malproksimiĝas je tiu kiu oferas al vi la tutan estimon de sia brusto?

Sed tiel, vi alvenos ja, al virina maljuneco!

Barcelono-Gracia.

ARTURO TORNÉ.

## DIVERSAJ SCIIGOJ

**Nova Gazeto.** — Korege ni korespondas la ĝentilan saluton de nia nova samlandana gazeto *Semo*, eldonita de la senĉese laboregema societo «Paco kaj Amo». (Strato Montseny, 67, 2.<sup>o</sup>).

Ni deziras al la ĵus aperinta gazeto; la plej grandan sukceson kaj, precipe, ke ĝi povu atingi sian esperon *igi efika la nomon de la gazeto kaj necesan aperon*.

★

**Grupo Laboro Esperanta.** — En kunveno kiu okazis la 16<sup>an</sup> Januaro, oni elektis la sekvantajn sinjorojn por la direktado de la Grupo:

Honoraj prezidantoj: S-ro L. Zamenhof, S-ro Gustavo Galcerán; prezidanto, Josefo Escofet; sekretario-enlanda, Joakino Serra; sekretario eks-terlando, Teresino Rosell; kasisto, Francesko Mestres; voĉdonantoj, Josefo García, Anĝelo Capitán, Marko Vadell.

Okazas ĉiu semajne krom klariganta kurso, kunvenoj por praktikiĝi pli kaj pli en nia esperanta lingvo.

★

**Rimarko.** — Tial ke ni ricevis kelkajn sciigojn, katalune redaktitaj, ni ilin ne publikas, ĉar ni deziras, iom post iom, presigi kiel eble plej malmulte da enlanda lingvo en «T. E.», kaj kutimigi la grupojn kaj eĉ la izolitajn esperantistojn nur uzi, por ĉio rilate al Esperanto, la Zamenhofan lingvon.

★

**Clot (Barcelona).** — «Ĉiam Antaŭen!» En tiu-ĉi laborema grupo estas ĉiu tage pli nombra la adeptoj partianoj de la Zamenhofa lingvo, pro la entuziasmo kaj abnegacio de iliaj samgrupanoj; vera pruvo pri tio estas la ĵus finita kurso kiun donis S-ro J. Borrás. Tiun kurson oni fermis kun la ĉeestado el 25 gelernantoj. Jen la Direkta Komitato, por la daŭrigado de ĉi-tiu jaro.

Sinjoro Ramon Soler, prezidanto; S-ro Jaume Guillomia, sekretario; sinjoro J. Serradell, kasisto; S-roj Joan Borrás, Lluís Gascón, voĉdonantoj. En Venonta numero ni publikigos vastan programon informante pri la malfermo de novaj kursoj.

★

**Festo.** — Por festi la 50<sup>an</sup> datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la grupo «Kvinpinta Stelo» organizis kunvenon tre sukcesan.

Oni prezentis katalunan komedion, kaj la monologon *Venĝemulinelo*, de fraŭlino Saltiveri. S-ro Reig la konata esperantista baritono kantis *Mi rakontis*, de S-ro Sunyer. La festo finiĝis per balo.

★

**Propagandaj Artikoloj.** — Nia fervora samideano S-ro Mensa, publikigis kaj daŭras publikigante ankoraŭ en la gazeto *La Veu de la Costa*, el Arenys de Mar, serion da artikoloj por la propagando de nia lingvo. Ni ĉiam pensis ke la propagando per la gazetaro estas unu el la plej bonaj rimedoj por diskonigi nian ideon. Gratulojn!

## BIBLIOGRAFIO

En tiu ĉi fako oni konigos la verkojn kies aŭtoroj donacis du ekzemplerojn al T. E.

**PLENA VORTARO ESPERANTO - ESPERANTA KAJ ESPERANTO. FRANCA.** — Unua parto. Aŭtoro Emile Boirac Rektoro de la Dijona Universitato Presejo Darantiere; 65, str. Chabol-Charny. Dijon. (Prezo nemontrita.)

En la prologo de tiu ĉi grava verko, la konata Direktoro de la Akademio Esperantista, skribas kelkajn komentariojn, eĉ konsilojn al la aŭtoroj de vortaroj naciesperantaj, plenajn de intereso kaj de praveco.

«Unue estus laŭ nia opinio, senutile aŭ por pli ĝuste diri, malutile, — diras S-ro Boirac, — se ili enkondukus vortojn ne efektive apartenantajn al ilia propra lingvo, sed okaze prunteprenitajn de ia tute diferenca lingvo, kiel ekzemple en Vortaro Angla aŭ Franca, vortojn arabajn, hinajn, japanajn, k. t. p...» «Se ni ne timus ŝajni tro postulemaj, ni dirus ankaŭ al ĉiuj verkistoj: Ĉu tio tre ĝenu vin atentigi iamaniere la legantojn, pri ĉiu nova vortradiko kiun vi dezirus kaj provos enkonduki en la komunan uzon? Tion ĉi vi povus tre oportune fari, signante per noteto malsupre de la paĝo la novan vortradikon, kies signifon kaj devenon ni montrus...»

Ĉiam ni pensis ke por enkonduki novan vorton en la lingvon, la plej granda singardo estas malmulta: tiel agante la granda simpleco de Esperanto, kiu grandparte devenas de la malmultvorteco de l' vortaroj, estus nur teoria. Sed tamen tiom da malĝustaj, nekorektaj, kaj malfacile kompreneblaj esprimoj, enŝoviĝis en la lingvon pro manko de ekzaktaj vortoj, ke, verdire, ni kore dezirus la tujan kaj kiel eble plej baldaŭan malaperon de vortoj tre ofte uzataj en nia ordinara vivo, kiuj pro ĝia konstanta uzado fariĝis komunaj, sed kies komprenebleco estas nula.

La malnovaj esperantistoj uzadas ĉiutage vortojn kiel *eldoni*, *elpensi*, *aliĝi*, k. t. p., kaj tiaj vortoj estas tiel ofte skribataj en gazetoj, libroj, artikoloj k. c., ke la esperantoskribantoj eĉ senpense kaj senkonscie faras el ili uzon.

Tamen, ne ĉiu esperantisto estas malnova, kaj ĝis kiam liaj okuloj kutimiĝis vidi diversfoje skribitajn tiujn vortojn, li sentas la ĝenon kiun okazigas ĉiam, la trovo de vorto ne sufiĉe bone komprenata aŭ tute ne komprenata. Se la vortoj antaŭnomitaj oni anstataŭus per *editi*, *inventi*, *adheri*, aŭ similaj, ĉu ne gajnus multe la klareco de la lingvo?

Oni ne diru ke kvankam la klareco gajnus, perdus la simpleco de la vortaro, ĉar, kion signifas la aldono de kelkaj dekoj da vortoj, kompare kun la tuta esperanta vortaro? Kiu lernis milon da vortoj tiu, ja povas lerni milon kaj duonon!

Revenante al la temo de nia skribo, t. e. la Vortaro de S-ro Boirac, kies speciala celo invitis nin fari iun komenton pri vortaraj demandoj, ni sincere konfesos ke ĝi estas verko tute laŭdinda.

La speciala verkmaniero de la aŭtoro, kiu metas la francan tradukon apud ĉiu esperanta radiko, estas sekvinda de la verkantoj de naciaj vortaroj: tiel oni atingos la deziratan unifikon de la esperantaj vortaroj.

